# FRANCA KATOLIKA ESPERANTISTO

**N° 194 OKTOBRO 1997**

La numero : 10 FF Abono: 40 FF Kotizo: 20FF Sume: 60 FF

TRIMONATA BULTENO de FRANCA KATOLIKA ESPERANTO ASOCIO
(Filio de I.K.U.E= Internacia Katolika Unuiĝo Esperantista )
BULLETIN TRIMESTRIEL DE L'ASSOCIATION CATHOLIQUE FRANCAISE
POUR L'ESPERANTO.

*** *Sankta* **PIO X**-*a, preĝu por ni.* ***



Congrès de La Houssaye en Brie
Mai 1997

Le 03 septembre 1997
le
**Pape**
a accueilli les
Congres-
sistes d'
IKUE en esperanto!

# Sommaire/*Enhavo*

| | | Pages/*Paĝoj* |
|---|---|---|
| Le mot du président | *La bileto de la prezidanto* | 3 |
| Prière | *Preĝo* | 5 |
| *Johano-baptisto SCALABRINI* | *Patro de la elmigrantoj* | 6 |
| Congrès aux pays des abeilles | - Kongreso en abelolando | 8 |
| A travers le monde | *Tra la mondo* | 10 |
| Dans notre association | *En nia asocio* | 11 |
| Boites aux lettres | *Leterkesto* | 14 |
| Calendrier | *Kalendaro* | 17 |
| Annonces | *Anoncoj* | 17 |
| Abonnements | *Kotiztabelo* | 19 |

**ESPERANTO : INTERNACIA LINGVO**

Expéditeur : Ass.Cath.Française pour l'espéranto
*Sendinto* 9,Rue Paul Doumer
F- 68920 WINTZENHEIM-COLMAR

**Motif de non distribution**

- ☐ Adresse insuffisante
- ☐ N'habite pas à l'adresse
- ☐ Refusé
- ☐ Autres


Périodique Semi-routé

**PORT PAYE**

COLMAR (68)

## Surkovrile

Kelkaj partoprenantoj de la Kongreso en La Houssaye-en-Brie en majo 1997 .
(Foto JR. Marmou)



Bonvolu pardoni min pro la prokrasto de la eldono de tiu bulteno . Venontaj bultenoj aperos akurate .Do n-ro 195 , antaŭ Kristnasko.

> L'esperanto. Face aux problèmes linguistiques, une langue neutre vraiment internationale pour les contacts directs d'homme à homme.

Ĉiujn artikolojn oni rajtas reprodukti kondiĉe ke estu citata la fonto.Specimenon kun represo aŭ tradukado oni sendu al la redaktoro.

La materialon por la bulteno oni sendu al la redakcio nepre antaŭ la 20.a de februaro,majo,aŭgusto kaj novembro.

Finpresado la 25/10/1997

*FRANCA KATOLIKA ESPERANTISTO*

**Nro 194 Oktobro 1997**

Trimonata eldonaĵo de Franca Katolika Esperanto Asocio (Association Catholique Française d'Esperanto A.C.F.E )
CCP : 2 324 93 N Rouen
Prezidanto:
S-ro A. BESSIERE
28,Rue C.St-Saëns
76000 ROUEN
Sekretario:
F-ino A.M CHANEY
56,Rue Corvisart
75013 PARIS
Kasisto :
S-ro G.VILLENEUVE
14,Rue Clair de Lune
91530 SAINT-CHERON
Religia Konsilanto :
P-ro L.BOURDON
7,Av. Salomon
59800 LILLE
Peranto IKUE:
S-ro M.COLLEU
95,Rue Victor Hugo
80440 BOVES
Redakcio :
Fam.BASSO-RESCIO
9,Rue Paul Doumer
68920 WINTZENHEIM
Fakse 0389794333
Re.e 100623.3022@Compuserve.com

# Le Mot du Président

L'année 1997 a été déclaré année contre le racisme. Il est évident qu'en tant que chrétiens et espérantistes nous ne pouvons qu'approuver la lutte contre le racisme,négation de la dignité de l'Homme.

Nous le savons. Nous sommes tous fils de Dieu: tous nous avons été rachetés par le sacrifice de Jésus,mort sur la croix pour sauver l'humanité entière,sans distinction de race. St-Paul n'a t-il pas déclaré (Ga.3.28) que pour un chrétien,il n'y a pour les baptisés ni homme,ni femme,ni esclave,ni homme libre,ni grec,ni juif, car nous sommes tous qu'un en Jésus-Christ. C'est pourquoi nous n'avons aucune distinction à faire entre les hommes qui sont tous égaux devant Dieu et tous appelés au salut éternel.C'est la doctrine du Christianisme;l'Eglise l'a toujours profésée et l'enseignera toujours.

Les espérantistes,même ceux qui ne sont pas chrétiens,ont toujours pensé que la pratique de la langue internationale avait comme corollaire une affirmation de l'égalité entre les hommes et portait en elle un idéal de tolérance,d'amitié et de respect pour tous les êtres humains,d'où qu'ils soient. Zamenhof était un humaniste profondément imprégné de cet idéal de paix,de concorde et d'estime envers tous les hommes. Après plus de 100 ans d'existence,cet idéal n'a pas changé. Il suffit d'assister à l'un de nos congrès pour constater que l'on pratique l'amitié,la tolérance et que rien n'y vient troubler la parfaite concorde qui régit les rapports entre les participants quelles que soient leur origine ou leurs opinions philosophiques ou religieuses.

Si cet idéal ,à la fois chrétien et espérantiste, était celui de notre monde actuel,nul doute que les relations entre les communautés et les nations seraient harmonieuses et pacifiques.

# La Bileto de la Prezidanto

La jaro 1997 estis proklamita jaro kontraù la rasismo. Evidentas ke kiel kristanoj kaj esperantistoj,ni povas nur aprobi la antagonismon kontraù la rasismo,neado de la Homa digneco.

Ni scias tion. Ni ĉiuj estas filoj de Dio; ni ĉiuj estis elaĉetitaj per la ofero de Jesuo,mortinta sur la kruco por savi la tutan homaron, sen distingo de raso. S. Paùlo deklaris (Ga.3,28) ke, por kristano,kiu al Kristo baptiĝis,estas nek judo,nek greko,nek sklavo,nek liberulo,nek viro,nek virino; ĉar ni ĉiuj estas unu en Kristo kaj vokitaj al la eterna savo.Tio estas la doktrino de Kristanismo; la Eklezio ĉiam konfesis tion kaj ĉiam instruos tion.


La esperantistoj,eĉ la ne-kristanoj,ĉiam opiniis,ke la praktikado de la internacia lingvo entenas kiel korolarion,la aserton de egaleco inter la homoj kaj idealon de toleremo,amikeco kaj respekto al ĉiuj aliaj homoj,de kie ajn ili devenas. Zamenhof estis humanisto,funde penetrita de tiu pacidealo,konkordo kaj estimo al ĉiuj homoj. Post pli ol 100 jaroj de ekzistado tiu idealo ne ŝanĝis;sufiĉas ĉeesti unun el niaj kongresoj por konstati ,ke oni praktikas tie amikecon,toleremon kaj nenio ĝenas la perfektan konkordon,kiu enpenetras la rilatojn inter la partoprenantoj,kiaj ajn estas ilia deveno aù iliaj filozofiaj aù religiaj opinioj.

Se tiu idealo,samtempe kristana kaj esperantista,estus tiu de nia nuna mondo,sendube la rilatoj inter la komunumoj kaj la nacioj estus harmoniaj kaj pacaj.



## FIDO

Nenio malserenigu vin,
Nenio timigu vin ;
Ĉio trapasas.
Dio ne ŝanĝas,
Pacienco ekhavigas ĉion.
Kiu Dion posedas,
Al tiu mankas nenio;
Dio sola sufiĉas.
(Tereza el Avila)



*Mirinde estas la vojoj de nia Sinjoro.*

## PREĜO

O Sankta Tereza je la Infano Jesuo,
kiu meritis la titolon Patronino de
la tutmondaj Katolikaj Misioj,
memoru pri la forta deziro,
kiun vi esprimis sur la tero,
pri plantado de la Kruco de Jesuo-Kristo sur
ĉiujn albordiĝejojn kaj anonco de la Evangelio
ĝis la fino de la jarcentoj.
Ni petegas vin, laù via promeso,
helpu la pastrojn, la misiistojn, la monaĥinojn,
la tutan Eklezion.
Amen

Sendita de "Procure des Missions"
76530 GRAND-COURONNE
(Tradukis J.V)


**JOHANO-BAPTISTO SCALABRINI,**
Patro de la elmigrantoj (1839-1905)

*Tiu samepokulo de Zamenhof estos beatigota en Romo la 9.an de novembro 1997.*

Li naskiĝis en Fino Mornasco, proksime de Como (Italio) en julio 1839. Lia granda frato Jozefo provis la vojojn de la elmigrado sed pereis en ŝiprompo en la marbordo de Peruo. Pro tio jam en propra familio li spertis la dramon de la elmigro. Ankaŭ alia frato , Petro, el 8 gefratoj, pli bonŝance elmigris en Argentino, kie li iĝis vic-guberniestro de Parana kaj direktoro de la Muzeo Escolar de Bonaero. Dekok jara li decidis pastriĝi. Li studis en la seminario de Como kaj ŝatis lerni ĉion, ne nur teologion sed ankaŭ modernajn sciencojn. Li bonege sukcesis en lingvoj (latina,greka,hebrea, franca, germana, portugala kaj angla). La 30.an de majo 1863 li pastriĝis kaj volis iri eksterlanden sed la episkopo diris : "Viaj Indioj estas en Italio !" Do li estis profesoro pri Historio kaj greka lingvo dum sep jaroj en la seminario de Como. Dum la somero li asistis la ĥolerulojn kaj helpe de sciencula amiko,li lernis la surdamutulan "lingvon" .
En 1870 li estas paroĥestro en Como kaj eldonas libron "Katekismo por Infanoj" . En 1875 li estas episkopo de Piacenza. Li trovis inspiron en profunda kaj firma teologio.Li vidas la Filon de Dio, kiu ageme ĉeestas en la progresado de la homaro.Jesuo unuiĝas la popolojn en unu familio, tio daŭrigas en la mistero de la Eŭkaristio. Li ankaŭ profunde preĝis la Madonon kaj ankaŭ estis sindonema al sanktuloj, ĉar li opiniis ke la ekzemploj de la vivo de sanktuloj povas helpi en nia mondo.Kiel episkopo li volis viziti ĉiujn paroĥojn (366) kaj li volis havi rektajn



kontaktojn kun la popolo.
La dua vojo de Mgr. Scalabrini estis la instruo de la katekismo, pro tio li skribis librojn , eldonis bultenojn, organizis kongresojn. Li oponiis ke nepras havi unikan universalan katekismon. Dum la malbona vintro 1879-80 , li organizis popolan manĝejon per la donacoj kaj eĉ vendis propraĵojn (ĉevaloj,kaleŝoj,vatikana kaliko ...) .Li diris : "episkopo ne devas timi mizeron, ĉar Jesuo naskiĝis en stalo " . Iun tagon , en la staciodomo de Milano, li estis profunde kortuŝita ĉar li vidis mizeran homamason kiu atendis la trajnon por elmigri. Kielmaniere helpi ilin ?
En 1887 , li eldonis la libron "La itala elmigro al Ameriko" kaj fondis la Kongregacion de la Misiistoj de Sankta Karlo por asisti la elmigrantoj. [ en tiu jaro ankaŭ Esperanto naskiĝis ] . Jam en 1888 dek misiistoj foriris en Brazilo kaj Usono. Ili havis kiel patrono Sankta Karlo Borromeo (1548-1608) . Sep jaroj poste li fondis kun amiko la Kongregacion de la Misiistinoj de S. Karlo, por zorgi pri la lernejoj,katekismo,asisto al la malsanuloj,orfoj , ... En 1901 li vizitis elmigrantojn en Usono,trairante de unu urbo al alia (15.000 km). En Vaŝington li renkontis la prezidanton Th. Roosevelt .
En 1904 li akompanis ses misiistojn kaj 500 elmigrantojn en Brazilo. Sed pro malsano kaj lacego dum la tago de la Ĉieliro de 1905 , li eligis sian animon al Dio.


SCALABRINI

Hodiaŭ la Kongregacio konsistas el : 726 misiistoj, 5 episkopoj en 25 landoj. En Francio la unuaj misiistoj venis en 1936.

# Kongreso en Abelolando

Hodiaù la abeloj de F-to Marmou zumadas pli brue ol kutime. De abelujo al abelujo kuras la novaĵo,ke esperantistoj kongresas en La Houssaye en Brie. Kaj la abeloj tuj decidas diligente labori,por produkti la mielon,kiun ĉiu kongresano aĉetos.

En la vespero de la vendredo ,la 23-an de majo 1997, la kongresanoj jam interkonatiĝas . Ili revidas konatajn amikojn kaj amikiĝas kun novaj.Poste ili kune preparas la kantojn por la dimanĉa diservo.

Sabate matene Pastro Bourdon majstre pritraktas la kongresan temon pri la progreso de la popoloj. La ideoj estas multnombraj kaj la posta diskuto vigla.

En la posttagmezo okazas la ĝenerala kunveno,kies protokolon vi legos aparte.

Je la 18.a,en la kapelo Pastroj Bourdon kaj Girault diservas kun la helpo de la oficiala meslibro,dum la ĉeestantaro kantas taùgajn kantojn.

Dimanĉe ĉiuj ekskursas per aùtobuso. Matene ili vizitas la eksteraĵojn de Disneyland. La vetero estas treege suna kaj multnombraj homoj rapidmarŝas al la enirejo. En tiu usona mondo,ĉio estas farita por la plezuro de la vizitanto: florbudoj,akvujoj kaj spruĉfontanoj ĝojigas nin. Sed la tempo rapide forflugas kaj ni revenas al la kongresejo por tagmanĝi.

Postagmeze la aùtobuso kondukas nin al la palaco Vaux le



Vicompte,konstruita de la surintendanto; Fouquet. Ni ĉiuj admiras la malnovajn ĉevalveturilojn,karosojn kaj paradkaleŝojn,antaù ol eniri la palacon,kie mebloj en lukse ornamitaj salonoj plezurigas niajn okulojn.

La parko estas belega kaj vasta sed bedaùrinde oni ne rajtas restadi tro longe; la horo de la reveno jam sonis !

Lunde matene la komitato bone laboris por prepari la venontan agadjaron. La protokolon vi legos aparte.

Post la tagmanĝo F-to Marmou gvidas la grupon en la vilaĝo,kie malnova palaco,preĝejo kaj aliaj vidindaĵoj interesas nin. Finfine ni promenas en la parko cirkaù la kongresejo kaj adiaùas la laboremajn abelojn.



Bildo sendita de s-ro Jozef Zielonka (Tarnow- Pollando), kiu fratece salutas nin.

TRA LA MONDO :

La Monda Konferenco pri Religio kaj Paco (angle mallongigite WCRP ) ĵus akceptis ASISTI kiel "institucian membron" sekve de 3-jara klopodado. WCRP,kies sidejo estas ĉe UNo, en Nov-Jorko - Usono, estas la plej grava el la tutmondaj interreligiaj organizoj,en konsultaj rilatoj kun la UNa Ekonomia kaj Socia Konsilio (kateg.I),UNICEF kaj UNESCO (kateg.B)
ASISTI estas esperanta Asocio de Studado Internacia pri Spiritaj kaj Teologiaj Instruoj.

## AUSKULTU VATIKANAN RADION

Elsendoj en **Esperanto** :
DIMANĈE - Horo 21.20 laŭ mezeŭropa tempo (10')
Mezonde :527 kaj 1530 kHz Kurtonde 4005(74.90 m),5880 (51.0m)
Satelite : Eutelsat II-F1,13 E 10.987 GHz,transponder 25,
Video NBC S,subportanto 7.39 MHz FM,Panda 1,Vert.Polar.
MERKREDE : Horo 21.20 laŭ mezeŭropa tempo (14')
Mezonde 1611 kHz,Kurtonde 6185(48.50m),7365(40.73m)
**Kaj skribu al : Radio-Vatikana - Esperanto Redakcio**
**SCV-00120 CITTA del VATIKANO**
**http://www.wrn.org/vatican-radio/**

**POLA RADIO** :Elsendoj en esperanto ĉiu-tage !
15h30 31,50m;41,18m;41,99m;50,00m(9525,7285,7145,6000kHz)
22h30 41,27m;49,71m;49,22m (7270,6035,6095 kHz)
Per satelito: Eutelsat II F-3-16 gr. orienta lat., 11.080 GHz H
Subportanto 7,38 MHz . Ĉiutage : 06h30 - 15h30 kaj 20h00
Pola Radio-Esperanto Redakcio PF 46 PL-00977 VARSOVIO



## EN NIA ASOCIO

Novaj membroj 1997:
03/ S-ro MARTIAL (Manche)
04/ S-ino ABADA SIMON (Hauts de Seine)
**Bonvenon** al la genovuloj !
Donacis monon:
F-ino VILLANOVA, S-roj CORNUT kaj ANGEVIN,
S-toj GIRAULT kaj RUNPAOT .
Bonfarantino 1997:
5/ S-ino CHEVERRY (Maine et Loire)

Dankegon al ili pro ilia grava helpo al nia asocio.

### PROTOKOLO DE LA GENERALA KUNVENO EN LA HOUSSAYE EN BRIE

La kunveno okazis en la posttagmezo de la 24-a de majo 1997. S-ro Bessière prezidas.

S-roj Angevin,Basso,Simonet,Vignaud (TEJO), Texier (UFE) kaj Bodian (Senegalio) salutis la kongreson.S-ro Pons , malsana, senkulpiĝis.

La agadraporto kaj la financa raportoj estis aprobitaj de 28 personoj;2 voĉdonis kontraŭ;2 sin detenis.

En la baloto por la renovigo de la komitato,la kandidatoj ricevis la sekvantajn vocojn:

| | |
|---|---|
| S-ro Basso 32 | S-ro Bessière 32 |
| S-ro Despiney 31 | Pastro Bourdon 29 |

la venonta ĝenerala kunveno okazos en julio 1998 okaze de la ekumena kongreso en Nantes.

La libro "Dio parolas al siaj infanoj" estas nun preta; ĝi estos aĉetebla ĉe S-ro Pons.

## PROTOKOLO DE LA KOMITATKUNVENO DE LA 26-A DE MAJO 1997.

La komitatkunveno okazis en La Houssaye en Brie.
Ĉeestis: S-ro Bessière,F-ino Chaney,S-ino Lafargue,s-roj Colleu,Lafargue,Pastro Bourdon,F-to Marmou.
Petis senkulpiĝon:S-roj Pons,Despiney kaj Villeneuve.
La komitato dividis la taskojn inter la komitatanoj. Krom S-ro Colas, kiu kompreneble restas Honorprezidanto,la komitato konsistas nun el la sekvantaj personoj:
Prezidanto: S-ro Bessière
Vic-prezidantoj : S-ro Pons kaj S-ro Lafargue
Sektetariino: F-ino A.M. Chaney
Helpsekretariino:F-ino Michel
Kasisto: S-ro Villeneuve Helpkasisto: S-ro Colleu
Redaktoro de la bulteno: S-ro Basso
Religia konsultanto: Pastro Bourdon
Membroj: S-ino Lafargue, S-ro Despiney, F-to Marmou.
La komitato konfirmis la ĉeeston de nia asocio en la ekumena kongreso en Nantes;ĝi komisiis Pastron Girault por organizi,kune kun S-ro Cousson el KELI, la ekumenajn diservojn en Nantes kaj poste en Montpellier,kun kompreneble la aproboj de la du koncernantaj episkopoj.
Ni klopodos pilgrimi al Lourdes en 1999.
La venonta komitatkunveno okazos en Parizo la merkredon 22-an de oktobro 1997.

### Ni funebras kaj kondolencas .

**Forlasis nin ĉi tiu nia frato :**
**- S-ro Roger BERNARD** (01.08.97) en Colombes Hauts de Seine (90-jara)
***Al la familioj, sincerajn kondolencojn.***
***Ni preĝu por la ripozo de la animoj de tiu kara amiko kaj frato en Kristo.***



Ĉi-sube vi povas legi leteron de Vatikano al S-ro René Centassi,eks-ĉefredaktoro de "Agence France-Presse" Parizo.

<< Du Vatican,le 1er Juin 1996

Monsieur,

Le 26 avril dernier,vous avez offert en déférent hommage au Saint-Père un exemplaire de l'ouvrage "L'homme qui a défié Babel,que vous avez écrit en collaboration avec Henri Masson.
Je suis chargé de vous remercier vivement pour l'envoi de ce livre,dans lequel vous présentez la vie de Ludwig Lejzer Zamenhof qui,tout au long de sa vie,manifesta son désir profond de "créer des ponts" entre les hommes; on apprécie son souci constant de favoriser la communication et la réconciliation entre les personnes et les peuples, pour édifier une société plus fraternelle.
Sa Sainteté vous accorde sa Bénédiction apostolique,ainsi qu'à Monsieur Masson et à tous ceux qui vous sont chers.
Je vous prie de croire,Monsieur,à mes sentiments cordiaux et dévoués.

Mgr. L. Sandri
Assesseur >>



Kovrilpaĝo de tiu libro : 408 p.
(Editions Ramsay : 1995)



Poŝtmarko de Belgio :1982
okaze de la 67.a UK .

# LETERKESTO

Esperanto en Fokolara Movado !

Vi ricevas unuafoje la "Novan Urbon" . Tial ni aldonas koncizan informon pri Fokolara movado,kiu havas dekmilojn de sindonaj aktivuloj kaj ĉirkaù 2 milionojn de simpatiantoj en 180 landoj ! Pro sia universala kontribuo al tuthomara unueco,inter-religia dialogo kaj transpaŝo super ĉiuj dividoj, Fokolara Movado kaj ties fondinto Chiara Lubich ne nur altiras ĉiam pli kaj pli da popoloj. La movado kaj ĝiaj branĉoj (ekz. Novaj Familioj, Junularo por Unuiĝanta Mondo,Nova Homaro k.a ) estas ankaù internacie rekonataj de multaj ŝtatestroj,scienculoj kaj religiaj gvidantoj.

Fokolaro ekestis dum terurajoj de la 2a mondmilito,kiam homa vivo ŝajnis esti tre malkara. Tiam kelkaj knabinoj en norda Italio konsciiĝis ke ĉio,kion faras homoj estas nur kelktempa kaj ofte iluzia.Stariĝis la demando: kio povas esti la plej firma,sekura bazo por homa vivo ? La respondo montriĝis evidenta - nur Dio , ĉiopova Kreinto estas la idealo,kiun neniu forto kapablas nuligi. Dio estas la Fonto de ĉiu beleco en la mondo;nur Li, kiel nia Patro donacas homon per vivosenco kaj liberigas lin de malespero. Havante unu Patron,ĉiuj homoj estas gefratoj sendepende de nacieco,raso aù religio.Ĉu tio ne memorigas nin pri la Zamenhofa "Preĝo sub verda standardo "? Bedaùrinde , nek Fokolaranoj scias multon pri Esperanto kiel genie facila neùtrala lingvo, nek esperantistoj pri Fokolara tutmonda agado favore al unueco. Necesas plej vaste informi,ke kunlaboro inter ambaù movadoj povos multobligi fruktojn de iliaj samcelaj (kvankam multjare apartaj) strebadoj. Tion hodiaù bezonas urĝe nia kaosa mondo, plena je konfliktoj .NOVA URBO estas nia E-lingva vario inter la multnaciaj Fokolar-publikaĵoj,kiuj eble post kelka tempo komencos ankaù informadi vaste pri esperanto. Ni ŝatus ricevadi ofte viajn opiniojn pri la enhavo kaj kompreneble pri viaj spertoj: kiel repaciĝi kun la najbaro, kion vi faras por konstrui harmonion en via komunumo,kiel vi sukcesas venki viajn malfortaĵojn ktp.Bonvolu neniam forgesi,ke tia interŝanĝo de spertoj povos tre utili al ni ĉiuj ! Tiel ni faros ĉi tiun novaĵleteron ĉiam freŝa,viva kaj - ni esperu - nia Internacia Lingvo fariĝos pli kaj pli ofte uzata en ĉiuj kontinentoj. Ne eblas ĉion gravan prezenti en ĉi tiu letereto; vi trovos diversajn novaĵojn en la sekvontaj numeroj . Se vi deziras ricevi pli da informoj pri Fokolar-movado,ĝiaj historio,disvolvo kaj agado, ni plezure sendos al vi kelkpaĝan tekston pri tio. Dume ni sendas al vi amikajn salutojn el granda,multlingva Kanado.

NOVA URBO
2 LeMoyne Place
HAMILTON, Ont L8J1C1
Kanado

(Kune kun Nova urbo Aprilo:1997)



Esperanto ĉe TAIZE :

En bela pejzago de la Nigra Arbaro (Germanio) kun ĉiam brilanta aùgusta suno, renkontiĝis pli ol 60 junuloj el naù landoj por sperti novan eksperimenton:ili partoprenis JUNULARAN EKUMENAN TENDARON por kanti, ludi, danci, kaj preĝi. Komuna lernado de esperanto helpis transiri la lingvajn barojn kaj instigi al pli profunda internacia komunikado.

Pro bonaj spertoj ankaù venonte okazos JET-oj, al kiuj la organizantoj jam nun invitas :

10a- 16a de aùgusto 1998 en la frata komunumo de TAIZE.

Bonvenon al ĉiuj ,kiuj volas internacie kontribui al

ekumeno.Petu pli detalan programon al :
Pastro Bernhard Eichkorn
Romaeusring 20 DE-78050 VS- VILLINGEN
Germanio. Tel: 0049 7721 22073.

(laŭ letero de Ursula Niesert: 03.10.97)

<< Samideanoj en Kristo,

Nun sepdekaĝa, lernanto de Zamenhofa lingvo nur antaŭ tri jaroj, mi tre malfrue malkovris tiun mirindan komunikadan neŭtran lingvon. Nun mi studas ĝin mem kun speciala fervora pieco kaj profunda pasio.
Mi estas feliĉa scii ke Lia Sankta Papo Johano Paŭlo II.a estas plene favora al esperanto, ĉar mi ĉiam opinias ke ĝi donas al la mondo la ununuran linion ende sekvi, tiu, pri fundamenta moralo kaj logiko........
Kun interesego mi legas ĉiujn bultenajn artikolojn kaj ŝatas ĝin. En la bulteno la aŭtoro invitis legantojn proponi iu ajn temon . Mia humila opinio: eble iuj ŝatus trovi ĉiu-foje iun parton de la Misalo en esperanto . Volonte, pri mi, mi adoptus la kutimon legi kaj mediti ĉiutage esperantan tekston ĉe miaj preĝoj.......
Dio benu vin, ...... >> S-ro MARTIAL (Manche)

*Red: Ni startos tiun rubrikon en venonta bulteno . Dankon por la ideo.*

## ANEKDOTOJ

La urĝo estas farita
La neeblo estas farata
Por la mirakloj, bonvolu antaŭvidi limtempon.



# KALENDARO

1997

22/10 PARIZO
Generala Komitatkunveno.

1998

25/07 ĝis 01/08 NANTES
EKUMENA KONGRESO

01/08 ĝis 08/08 MONTPELLIER
UNIVERSALA KONGRESO

10/08 ĝis 16/08 TAIZE
JUNUKARA EKUMENA TENDARO
kun komuna lernado de esperanto

## ANONCOJ

07/ Haveblas jam kandeloj kun esperantaj surskriboj .

Post sia pensiigo s-ro Tuinder trovis tre interesan laboron kiel volontulo en metia kandelfarejo,ligita kun mondfama abatejo benediktana. Ankaŭ vi povas mendi kandelon .Ĉiun kandelon oni pentros aŭ ornamos laŭ via gusto kaj konforme al ĉiuj deziroj viaj.

Estas jam haveblaj kandeloj kun la surskriboj : "Esperanto,Lingvo Universala,Fariĝu Lumo, ".

Skribu en Esperanto al :
Abatejo S-ta Adelberto, Abdijlaan 26,
NL -1935 BH EGMOND-BINNE . (Nederlando)

09/: " ..*Kiel ĉiuj scias, la lasta Internacia Kongreso en Francio okazis en Marseille dum somero 1957. Do , venontjare,estus bone se ni povus proponi al niaj eksterlandaj gesamideanoj memorindan kongreson. Organizi Tutmondan Kongreson estas grava afero. Pro tio, la montpelieraj gesamideanoj bezonus multe da gebonvolemuloj por helpi dum la Kongresa Semajno-certe- sed ankaŭ antaŭe kaj poste.*

*Se vi intencas partopreni de la 1.a ĝis la 8.a de aŭgusto 98 kaj bonvolas helpi ,*

*Se vi povus libertempi unu semajnon antaŭe aŭ poste (aŭ la du ),*

*bonvolu vin proponi al* :Doktorino Yvette VIERNE
5,Rue du Docteur ROUX
34090 MONTPELLIER.

10/La Jaro " l'Alpha et l'Omega"

Specifa lernejo por prepari homojn respondi pro sia loko en la Eklezio kaj en la socio:
La Kongregacio de la Paroĥaj Kunlaborantoj de Kristo-Reĝo", starigas klerigan programon, "La Jaro - Alfa kaj Omega ", cele al helpo de junaj homoj inter 18-a kaj 28-a jaraĝaj por prepari sian vivon bazita sur Kristo kaj orientita al konstruo de la civilizacio de la amo.
La Jaro baziĝas sur kvar temoj : la komunuma vivo, la spirita vivo, la intelekta klerigado, la servo ĉe la Eklezio. Granda rimedo por interna strukturiĝo, ĝi celas faciligi dum la naŭ-monata daŭro , profundigado de la vira identeco.
Informoj ĉe : Pastro Philippe Barbier cper
"Nazareth" 26120 CHABEUIL
(Ricevita de Nazareth 24.6.97)

11/ Blindula membro ŝatus ricevi kasedon kun la legado de nia bulteno . Kiu volas fari tion ? Ĉu vi konas aliajn esperantistajn blindulojn kiuj ŝatus ricevi tion ? (Philippe N. )

## KURIOZAĴO

Ĉu vi scias ,kio estas la Festo de la Laŭrenciadoj ?

La 7.an de septembro 1997,la paroĥo Sankta Laŭrenco de Wintzenheim(68) invitis anojn de ĉiuj paroĥoj kun la nomo S. Laŭrenco. Alvenis kristanoj de 28 vilaĝoj el Alzaco por kune festi tiun sanktulon .
Ideo por viaj paroĥoj. Kiu estis S. Laŭrenco ? Vi legos tion en iu venonta FKE.

## Kotiztabelo 1997

I.K.U.E kun "Espero Katolika" 140 F
Peranto : S-ro M. COLLEU
95,Rue Victor Hugo 80440 BOVES
P.ĉ.k 10 621 81 P LILLE .

| | |
|---|---|
| A.C.F.E kun "Franca Katolika Esperantisto" unuopulo : | 60 F |
| geedza paro : | 80 F |
| infano ĝis 16-jara,pastro,religiu(in)o : | 30 F |
| bonfaranto : | 200 F |

Pagu al: Ass.Cathol.Franc.Esperanto CCP ROUEN 2.324.93.N

Dépot légal : 3ème trimestre 1997 C.P.P.A.P : N° 62532
Imprimé par : A.C.F.E à 9,Rue Paul Doumer 68920 WINTZENHEIM
Enregistrée le : 14 Juin 1996 à la Préfecture de Police de Paris
sous le n° 026831 ; Journal Officiel du 03/07/1996
Directeur : Albert BESSIERE Directeur délégué: Michel BASSO